

Burundo: Kiam naskiĝos virinaj rajtoj?



**Komunistoj sen
komuneco**

**Aŭtobusa
di-alogo**

Kiel eliri el la krizo?

MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...

Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Paĝoj: 624; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 33

ISBN: 978-90-77066-39-3

Prezo ĉe FEL: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte
de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be


Domo-domaĝo

Fiaskas la landa loĝado-politiko en Burundo pro diversaj kialoj. Kulpas interalie la kresko de la loĝantaro en la ĉefurbo, socipolitikaj krizoj, la malaltiĝo de la aĉetpovo de burundanoj kaj la manko de bona politiko pri loĝado.



11

Ekonomio ŝrumpas, sed kompanioj prosperas



Pro la ekonomia regreso, la merkato malvarmiĝas. Aŭtomobiloj tute ne vendiĝas, kaj multaj laboristoj estas maldungitaj. Grandaj vendejoj suferas pro malbona vendado, kaj ili serĉas diversajn rimedojn por pluvivi.

Eĉ nun iuj kompanioj profitegas.

17

Interkontinenta ligo



21

Ĉu vi scias, kio ligas du malproksimajn landojn: Venezuelon kaj Rusion? Jes, antaŭ nelonge Venezuelon oficiale vizitis la prezidanto de Rusio Dmitrij Medvedev, kaj venis militŝiparo rusia por komunaj manovroj. Sed fakte ilin unuigas unu antikva vorto.

politiko

KOSOVO	9
Dependa sendependeco	
JAPANIO	10
Vilaĝo por maldungitoj	
DIPLOMATIO	10
Peranto petita	
BURUNDO	11
Domo-domaĝo	
NEPALO	12
Komunistoj sen komuneco	
POLLANDO	12
Centra demando	

moderna vivo

PATROJ	13
Sol-vata	
UKRAINIO	13
Interrete – inter ni	
ALBANIO	13
Tragedio fundamenta	
BURUNDO	14
Kiam naskiĝos virinaj rajtoj?	
REKLAMADO	15
Aŭtobusa di-alogo	
ALBANIO	15
Ĉiamas iama amo	
ALBANIO	15
Pli amu	
INSTRUADO	16
Lernantoj senesperaj	

ekonomio

JAPANIO	17
Ekonomio ŝrumpas, sed kompanioj prosperas	

scienco

METEOLOGIO	18
Energiaj maŝinoj	

lingvo

AMERIKO	20
Kia lingva ekologio por daŭripova evoluo?	
Interkontinenta ligo	21

libroj

Panoramo de la Nerona Romo	22
Honesta portreto pri granda homo	24

enigmoj

Bone kalkulu !	26
Solvo de la litera sudoku novembra	26

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7-8
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonoj ...

> Per via FEL-konto.
 > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
 > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen.
 > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
 > El Usono per ordinara usona ĉeko.
 > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validadon fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
 > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
 > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
 > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.
 Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	24	27	14,4	5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	24	27	14,4	5	9
Britio	GBP	39	42	23,4	4	7
Bulgario	EUR	26	29	15,6	5	9
Ĉeĥio	EUR	34	37	20,4	5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	40	70
Estonio	EUR	26	29	15,6	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	46	50	27,6	5	9
Grekio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hispanio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hungario	HUF	6950	7750	4170	1340	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	42	45	25,2	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1460
Kanado	CAD	76	80	45,6	9	15
Kipro	EUR	34	37	20,4	5	9
Koreio	EUR	42	45	25,2	5	9
Kostariko	EUR	24	27	14,4	5	9
Kroatio	EUR	26	29	15,6	5	9
Latvio	EUR	26	29	15,6	5	9
Litovio	EUR	26	29	15,6	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	34	37	20,4	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	398	430	238,8	45	73
Nov-Zelando	NZD	105	110	63	11	19
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalia	EUR	42	45	25,2	5	9
Rusio	EUR	24	27	14,4	5	9
Serbio	EUR	25	29	15	5	9
Slovakio	EUR	26	29	15,6	5	9
Slovenio	EUR	34	37	20,4	5	9
Sud-Afriko	EUR	42	45	25,2	5	9
Svedio	SEK	466	499	279,6	49	86
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Usono	USD	78	82	46,8	8	14
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

> **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
 > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
 > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
 > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
 > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
 > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
 > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
 > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
 > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
 > **Franca:** Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
 > **Germanaj:**
 > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
 > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
 > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
 > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
 > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
 > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
 > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Reto: esperanto@saluton.net.
 > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr.
 > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecības 35-13, Rīga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
 > **Litova:** Laimius Straznickas, Laimius Straznickas, LEA, a.k. 187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
 > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: esper_lu@geocities.com.
 > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
 > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
 > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
 > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
 > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
 > **Ruslandaj:**
 > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalininograd, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 > Mikaelo Ĉertilov, PF. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu.
 > **Slovenaj:**
 > Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
 > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: beckford@telkomsa.net.
 > **Svedaj:**
 > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Kompatindaj redaktoroj



Inter kunlaborantoj de nia revuo estiĝis diskutado pri tiuj signoj, kiujn redaktoroj devas aldoni en la komputilo por prepari tekstojn de aŭtoroj (tajpaĵojn) por enpaĝigo kaj presado. Iuj kunlaborantoj karakterizas ilin kiel tro komplikajn aŭ eĉ superflujajn kaj kritikoj, ke ili estas tro multaj. Se interesas vin tiuj ordonoj, vi povas trovi ilin sub la retadreso www.monato.net en la rubriko *Konvencioj* sur la paĝo *Teknikaj konvencioj de MONATO*. Estas ĉirkaŭ 20 signoj, kiujn oni bezonas pli-malpli konstante.

Kiam antaŭ ĉirkaŭ 50 jaroj mi fariĝis redaktoro, ankaŭ mi devis lerni teknikajn indikojn. Tiutempe oni havis tajpaĵojn nur sur papero kaj redaktoro devis aldoni sur la marĝeno ĉiujn necesajn ordonojn por kompostistoj, ekzemple por dikigo aŭ kursivigo de vorto, por alineoj ktp. Sed krome sur la folio li devis permane indiki ĉiujn korektojn de eraroj kaj ŝanĝojn. Precipe multaj kaj komplikaj estis tiuj korektosignoj; entute por redakti mi kompatinda devis lerni pli ol cent diversajn komandojn. Krome, kiam artikolo estis kompostita, sur provpresaĵo oni devis denove korekti erarojn, kion tamen en grandaj entreprenoj kutime faris profesiaj korektistoj (reviziantoj). Sed dum enpaĝigo de gazeto per la kolumnoj de plumba kompostaĵo redaktoro

devis jen kaj jen laŭ indiko de kompostistoj ŝanĝi tekstojn, ekzemple redukti. Por tion fari, necesi legi la kompostaĵon seegule kaj surkape – do ankaŭ tion mi devis lerni.

Kompare al tiu tempo hodiaŭ estas relative facile redakti tekston per komputilo. Nun tajpaĵo alvenas jam kompostita (de la aŭtoro), redaktoro ja devas korekti, sed por tio oni bezonas preskaŭ neniujn komandojn: simple oni forviŝas erarojn aŭ aldonas vortojn aŭ mankantajn literojn. Tamen ankaŭ nun redaktoro devas aldoni indikojn ekzemple por kursiva vorto, por krei alineon k. s. Sed tio necesas nur pro la fakto, ke aŭtoroj uzas diferencajn komputilajn sistemojn. La solvo de problemoj kaŭzitaj de tiuj diferencoj troviĝas en la nomitaj teknikaj konvencioj, kiuj validas por ĉiuj sistemoj, tiel ke la eldonejo povas prepari artikolojn por presado tiel, ke en la revuo ĉio aperas samaspekte. Certe estas ĝene, ke ankoraŭ redaktoroj bezonas uzi (fakte superflujajn) komandojn, sed kompare al miaj jaroj de juna redaktoro tio estas bagatelo ...

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 30a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hissels-gasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzel-langasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono.
Telefono/faksilo (216) 297-0370.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librecozonojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net.

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzel-langasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Nova mizero

Dum mia infanaĝo la plenkreskuloj diris, ke en la kapitalismaj landoj ofte okazas financaj krizoj, tiam la ordinaraĵoj homoj malsatmortis pro malriĉeco, sed ke mia lando estas komunisma lando kaj oni ne timu tion. Tamen nun ankaŭ mian landon, kvankam ĝi nun ankoraŭ estas en la komunisma sistemo, trafas la monda krizo. Multaj fabrikoj, precipe tiuj, kiuj produktas varojn por aliaj landoj, malfacile vivtenas sin. Kaj feliĉe la estroj de mia registaro faris, faras kaj certe faros multajn laborojn por batali kontraŭ la forta krizo.

Xu Jinming
Ĉinio

Memorante miton

Iel kun malfruo mi ricevis la okto-bran numeron, kaj tie mi vidas en la artikolo *Memorante miton* (MONATO 2008/10, p. 8) grandan retajlon de historia vero.

La kosova batalo de serboj kontraŭ la turka agreso en 1389 ne estas mito, sed granda reala sanga batalo, kiel freneza homa interbuĉado laŭ tiutempaj teruraj kutimoj. Ĉi tiu batalo lasis profundajn spurojn en la kulturoj de la balkanaj popoloj, sed plej multe en la serba popolo, ĉar ĝi okazis sur serba teritorio kaj kun plimulta partopreno de serbaj batalantoj sub gvido de la serba princo Lazaro. Tial la serboj (kaj aliaj balkanaj popoloj) tra jarcentoj memoras tiun batalon.

Ĉi tiu fakto estas tute konata, kaj tial estas strange, ke la redaktoro pri „politiko” lasis ĉi tian tekston. La sendependeco aŭ deŝirado de Kosovo kaj Metohio el Serbio estas sub granda demando, ĉar la problemon solvi apenaŭ eblos en paca maniero, kio konvenus al la 21a jarcento.

Atanacije MARIANOVIĆ
Serbio

Kial altrudi sian reĝimon?

Norda Irlando rajtas unuiĝi kun sia historia patrujo Irlando. Kial Anglio altrudas al Norda Irlando sian reĝimon?

Sergeo URY
Rusio



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio
aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Kiel eliri el la krizo?

de Zlatko TIŠLIJAR

Ŝajnas, ke la disvolviĝo de la aktuala krizo (krizo de ekonomio, krizo de politiko, krizo de ekologio, krizo de socioj ktp) ĉiam pli montras, ke tute ne eblas antaŭvidi ĝian finon. Ŝajne la homaro unuflanke evoluis al stadio, kiu postulas ĝeneralan ŝanĝon, kaj aliflanke ĝi venis al punkto, de kiu la pluiro sur la malnova vojo kondukas al katastrofo. Ĉu eblas ion ajn antaŭvidi?

Ŝajnas al mi, kiel mi jam skribis en du antaŭaj artikoloj en MONATO, ke la informadika erao (rimedoj de moderna elektronika teknologio) signifas por la homaro similan salton, kian havis la kombino de transportevoluo kaj la invento de la vapormaŝino. Tiel komplekse ŝanĝiĝis la socia strukturo. Ekestis, post feŭda vivkoncepto, la burĝa, kiu inkluzivis la komencon de nova kapitalisma ekonomia ordo, nova rolo de bankoj, nova politika idearo pri libereco kaj egalrajteco de ĉiuj homoj, kaj ideo pri nacio. Ĉiuj tiuj konceptoj nun malnoviĝis kaj bremsas la evoluon de la nova informadika mondo.

Burĝa klaso

Ĉiu ĝisnuna revolucia ŝanĝo efektive ekestis pro tio, ke malkontentis tiu parto de la socio, kiu pro novaj cirkonstancoj ekposedis iun potencon, sed ne povis partopreni en politika povo, ĉar la malnovaj politikaj reguloj tion ne ebligis. Ekzemple, la ekestinta burĝa klaso en la 16a kaj 17a jarcentoj iĝis ĉiam pli riĉa, do pli potenca, sed ne rajtis partopreni en feŭda politika sistemo, do ne ricevis parton de regpotenco.

Kiu grupo nun fariĝas potenca pro la informadiko kaj ne povas partopreni en la regado? Nun la regpotencon



La krizo manifestiĝas per la kolapso de banksistemo kaj de financa merkato, en kiu la mono prezentas ŝuldon. Amaso da homoj protestis en majo en Londono dum kunsidoj de G20.

efektive havas financaj potenculoj (homoj kun multa mono: kapitalistoj, posedantoj de ekonomia povo). Ili pagas kaj efektive decidas, kiuj vere regu. En la informadika erao ĉiam pli da potenco gajnas informposedantoj, homoj, kiuj regas en la reto.

Armeaj sekretoj

Ili povas manipuli la amasojn pozitive (informi ankaŭ pri aferoj, kiuj en diktatoraj reĝimoj estas cenzurataj), sed ankaŭ negative (disvastigi malveron kun difinita intenco). Ili povas eĉ malkaŝi gravajn politikajn aŭ armeajn sekretojn aŭ detrui bankojn. Ili povas kaŭzi grandegajn haosojn per elektronikaj virusoj aŭ aliaj premoj.

Kiu regas en la reto, tiu influas al la granda plimulto de la homaro, kaj tio tute ne devas esti homoj kun multa mono. Inverse, la potencaj homoj povas esti malriĉuloj kun informadika talento aŭ – pli ĝuste – organizitaj grupoj en la reto, sen mono, sed kun multa scio.

Sekve pere de la reto diversajn formojn de povo transprenas grupoj kun scio. La mono jam dum multa tempo malgajnas la terenon, la laborpostenoj jam de longe malgajnas la batalon kun robotoj kaj elektronika administrado. Oni kalkulis, ke en alte evoluintaj landoj nuntempe kun difinitaj reformoj jam nuraj 10 % el la laborantaj homoj povas vivteni la aliajn 90 %. En

Germanio jam nun 35 % havas labor-postenojn kaj ili vivtenas aliajn 65 %.

Financaj potenculoj

La krizo manifestiĝas per la kolapso de banksistemo kaj de financa merkato, en kiu la mono prezentas ŝuldon. Tia sistemo, en kiu financaj potenculoj surbaze de „nenio“ (ĉar malantaŭ la valorpapiroj efektive troviĝas neniu vera valoro) sklavigas la ŝuldantojn, efektive ne plu kapablos refortiĝi. Cetero la kapitalisma financa filozofio rilatas al ununura dio: la profito.

Oni ne rajtas enspezi pli malmulte ol oni elspezas, sekve ĉiujare devas kreski la produktado de varoj, kiuj nun jam delonge ne plu servas al homaj bezonoj, sed al profito pro si mem. Daŭre oni klopodas krei ĉiam pli da arte inventitaj bezonoj kaj konvinki la aĉetantojn, ke ili devas aĉetadi sen efektivaj bezonoj. Tia sistemo

kondukas ĉiam pli rapide al kompleta katastrofo, detruo de rimedoj kaj venenado de la naturo.

Kiuj ŝanĝoj nin atendas? Laŭ mi la mono malaperos, ankaŭ la nocioj de laborposteno kaj ŝuldo bazita sur valorpapiroj. Sed tio ne povas okazi per unu salto. Estos transira periodo, en kiu unue oni devos reorganizi la funkcion de la ŝtatoj. Tiuj distribuos la monon laŭ la principo: sufiĉe al ĉiu ŝtatano por digna vivo kaj pli al tiu malgranda elcento da homoj, kiuj efektive profesie laboros. Ĝi devos zorgi pri instruado kaj edukado, ĉar la nova socio baziĝos sur scio: la sola devo de ĉiu estos daŭre lerni.

Merkata vetkuro

Restos privata posedo, sed la posedo de entreprenoj fariĝos alia. Mi povas imagi ekzemple la sistemon de memadministrado, kiu en Jugoslavio

funkciis tre sukcese dum pli ol 30 jaroj. Esence entreprenojn kaj fabrikojn posedis kolektive ĉiuj, kiuj tie laboris. Kiam ili foriris, ili perdis la posedrajton. Tio ebligis iuspecan merkatan konkuradon, tamen sub regado de la ŝtato.

Do, mi imagas pluan ekziston de mono kaj posedo, pluan ekziston de merkato (ja la homoj ne povas funkcii sen divido de potenco kaj sekve konkurado kaj premo), sed sen laborpostenoj. Laboros tiuj, kiuj volos havi pli da mono kaj potenco, kaj kiuj superos aliajn rilate posedon de scioj. Ĉiuj okupiĝos pri agadoj laŭplaĉaj kaj ofte rezultojn de profesia agado superos amatoraj rezultoj.

Ni troviĝas antaŭ grandegaj ŝanĝoj. Ŝanĝiĝos ankaŭ amaso da sociaj tabuoj kaj tiel nomataj moralaj valoroj. La ideo pri nacio kreita en la tempo de ekesto de la burĝa civita ŝtato ŝanĝiĝos; la ideo pri graveco posedi materiaĵojn, kiuj ŝajnis, ke unuopulo estas pli grava, ne plu validos: kial havi ĉiam pli grandan domon, se oni ne povas eĉ viziti ĉiun ĉambron ĉiutage, kial havi grandegan kaj multekostan aŭton, se oni ne rajtas veturi pli ol 130 km/hore?

Tolera kunvivo

Tiaj posedantoj estos traktataj kiel socie malutilaj stultuloj. Finfine oni valorigos moralon, kiu prizorgos rearanĝon de ekologiaj ekvilibroj; oni valorigos grupojn, kiuj zorgos pri serĉo de ekvilibro inter konkurado kaj tolera kunvivo. Ĝis tiu nova sinstrukturo de la homaro, en kiu ĉiuj eroj de la mondo estos kunligitaj per elektronikaj retoj, estiĝos multaj traŭmatoj. La nunaj potenculoj klopodos ĉiumaniere batali kontraŭ la ŝanĝoj – sed forpasis ilia tempo.

La granda krizo daŭros kelkdek jarojn, sed el ĝi eliros nova refreŝigita homaro, en kiu ne plu eblos ŝtato kun miliardoj da malsataj homoj kaj kelcentmilionoj da terure riĉaj, en kiu ne eblos, ke iuj ne havu puran akvon kaj puran aeron. Anstataŭ la planitaj militoj por akvaj rezervo, apokalipsaj bataloj por regi la posedon de terenoj, venos tempo nova, tempo en kiu ankaŭ ideoj kiel Esperanto ekhavas sian valoron. ■



La nunaj potenculoj klopodos ĉiumaniere batali kontraŭ la ŝanĝoj – sed forpasis ilia tempo. Protestoj jam ekis: majo 2009, Londono.

Dependa sendependeco



La 17an de februaro 2009 festis albanoj en Kosovo por saluti la unuan datrevenon de la deklaro pri la fondiĝo de la nova ŝtato de Kosovo.



Albanoj festas la unuan datrevenon de la sendependeco de Kosovo.

La 17an de februaro 2009 festis albanoj en Kosovo por saluti la unuan datrevenon de la deklaro pri la fondiĝo de la nova ŝtato de Kosovo. Ekde 1912 la regiono estis regata de diversaj eksaj jugoslavaj ŝtatoj (reĝa, komunisma kaj postkomunisma-miloŝeviĉeca) ĝis en 2008, danke al internacia subteno, ĝi deklaris sin sendependa.

Tamen laŭ Adem Demaçi, laŭreato de la premio „Saĥarov” por defendantoj de homaj rajtoj kaj demokratio, la sendependeco ankoraŭ ne estas kompleta. Ĝin baras tri faktoroj: Kosovo ne havas armeon; ĝi ne regas sian policon; kaj reprezentanto de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la Eŭropa Unio ankoraŭ rajtas disigi la parlamenton kaj la registaron kaj elpostenigi altrangajn oficistojn.

Principo

Plie, danke al la principo de „malcentrado” antaŭvidita de la plano Ahtisaari, jam fondiĝis en Kosovo almenaŭ 11 novaj pure etnaj serbaj komunumoj konsistantaj el po tri aŭ kvin mil homoj kaj posedantaj eksterordinaran aŭtonomecon.

Tie Serbio estas tute libera aktivi kaj daŭre nei la sendependecon de Kosovo. Ekzemple, ĝuste kiam albanoj festis la unuan datrevenon de la nova ŝtato, pli ol 40 serbaj deputitoj alvenis buse al Zvečan, en la norda parto de Kosovo, kaj tie kunvenis por ripete nei la sendependecon. Dume la polico, regata de la EU-instanco Eulex, indiferece staris.

Kiel ajn, estas notite, ke pli kaj pli da ŝtatoj agnoskas la sendependecon de tiu ĉi ŝtato, en kiu loĝas interalie pli ol du milionoj da etnuloj albanaj. Ekzemple, krom la 54 ŝtatoj, kiuj jam agnoskis Kosovon, baldaŭ al tiu ĉi grupo aliĝos Saŭda Arabio.

Bardhyl SELIMI

Vilaĝo por maldungitoj

La 31an de decembro 2008 laboristaj sindikatoj kaj civitanaj grupoj malfermis tiel nomatan „Jarŝanĝan vilaĝon por maldungitoj” en la centro de Tokio. Ili celis helpi senheimajn maldungitojn ĝis la 5a de januaro, kiam municipaj oficejoj ekfunkcios post la novjaraj ferioj.

La 1an de januaro 223 homoj dormis en tendoj preparitaj de la organizantoj. La 2an la nombro pligrandiĝis ĝis 270 kaj ekmanis tendoj. Interesiĝis ĵurnaloj kaj televido pri la vilaĝo, ĉar multaj japanoj sentis, ke la sama senlaboreco kaj senheimeco povus ankaŭ ilin trafi.

Samtempe ĉefministro Aso, jam malpopulara, timis, ke la afero povas sufoki lian kabineton. Li decidis disponigi registarajn konstruaĵojn kaj najbarajn elementajn lernejojn kiel provizorajn loĝejojn. Ĝis la 5a de januaro loĝis en la vilaĝo 499 homoj. Tie ili ricevis manĝaĵon kaj konsilon pri estonta laboro aŭ loĝejo. Helpis ilin 1692 homoj kaj kolektiĝis pli ol 24 milionoj da enoj.

Aŭtomobilkompanio

Laŭ januara enketo, inter oktobro kaj marto 124 802 laboristoj estos perdintaj sian laboron. Tiu cifero 1,5-oble pli grandas ol prognoza 80 512. Plej multajn maldungitojn (20 113) havas la gubernio Aiĉi, kie prosperis la aŭtomobilkompanio *Toyota*.

Ĝis la 1990aj jaroj neniu japanoj timis maldungon: ili laboris ĉe unu kompanio ĝis emeritiĝo. En la lasta duono de la 1990aj jaroj la situacio ŝanĝiĝis. Japana kapitalistaro provis postvivi en la tutmondiĝo de komerco, tial ĝi bezonis laŭokazajn laboristojn, kiujn ĝi povas facile dungi kaj maldungi laŭ la ritmoj de la ekonomio.

La registaro akceptis la situacion kaj

mildigis la regularon pri laboro. Tiamaniere kompanioj anstataŭis regulajn laboristojn per laŭokazaj dungitoj senditaj de laborperaj organizaĵoj.

Averto

Nur la Japana Komunista Partio kontraŭis la novan sistemon, antaŭvidante la eventualan mizeran situacion de laboristoj. Aliaj politikaj partioj aprobis. La registaro neglektis la averton de la Komunista Partio kaj faris nenion por evitigi eventualajn amasmaldungojn.

La maldungitoj ne estas asekuritaj, ĉar ili laboris mallonge en unu kompanio post la alia. Ili estas ege malmulte pagataj kompare kun regulaj laboristoj, kvankam ili faras preskaŭ la saman laboron. Kiam ili perdas laboron, ili devas forlasi ĉambron luitan de la kompanio. Kiam ili ne havas loĝejon, ili ne povas serĉi alian laboron, ĉar kompanioj ne volas dungi senheimulojn. Ili ne povas peti subvencion de la registaro, ĉar ili ne havas konstantan adreson. Tiamaniere naskiĝis multaj senheimaj maldungitoj, kiuj amasiĝis en la tokia jarŝanĝa vilaĝo.

Prospero

Terura estas la usonstila laborsistemo. Ekzemple, *Toyota* kaj *Canon* multe profitis de la malaltaj salajroj de diligentaj laboristoj en tempo de prospero; sed, kiam falis la ekonomio, ili tuj maldungis la laboristojn. La kompanioj tamen kaŝas sufiĉe da profito kaj eĉ plu distribuas ĝin al akciuloj.

Per tiu granda kaŝita profito ili povus plu dungadi laboristojn. Tamen la kapitalistaro forgesas, ke laboristoj estas ankaŭ konsumantoj. Kiam senlabora, kiu aĉetos aŭtomobilojn kaj fotilojn? Maldungi laboristojn kaj maltrankvi-

ligi popolanojn signifas malprosperigi kompaniojn. Ili baldaŭ konscios sian stultecon kaj ricevos la venĝon de la laboristoj, kiujn ili malestime traktis kaj maldungis.

HORI JASUO

DIPLOMATIO

Peranto petita

Petis islamaj ribeluloj, ke al-bana peranto intertraktu kun la uganda registaro, kontraŭ kiu ili militas ekde 1990. Raportis franca novaĵ-agentejo, ke Ramush Hardinaj, mem ribelulo dum la naci-liberiga milito en Kosovo, ankoraŭ ne jesis al la propono.

Hardinaj, dum kelkaj jaroj ĉefministaro de Kosovo, estis tamen ĉefa akuzito ĉe la internacia kortumo en Hago, Nederlando, kiu fine deklaris lin senkulpa.

Laŭraporte subtenas la uganda registaro la perantecon de Hardinaj. Diris registara ministro, ke necesas peranto, kiu bone rilatas kaj kun la Afrika Unio kaj kun Unuiĝintaj Nacioj.

Dum la interna milito en Ugando suferis dekmiloj da homoj devigataj forlasi siajn hejmojn. La islamaj ribeluloj estas jam forpelitaj el Ugando sed instalas sin en la Demokratia Respubliko Kongo.

Bardhyl SELIMI

BURUNDO

Domo-domaĝo

Fiaskas la landa loĝado-politiko en Burundo pro diversaj kialoj. Kulpas interalie la kresko de la loĝantaro en la ĉefurbo, socipolitikaj krizoj, la malaltiĝode la aĉetpovo de burundanoj kaj la manko de bona politiko pri loĝado.

Pezas la problemo al salajruloj, aparte al ŝtatfunkciuloj. Tiuj ne povas facile

pagi lukostojn kaj samtempe lernejo-kotizojn, kaj oni ne forgesu manĝaĵojn. Kiuj bonŝance posedas etajn parcelojn, ne povas ilin bone ekspluati pro kreskanta vivokosto (pli ol 200 % inter 1990 kaj 2008).

Sendependiĝo

Akiri loĝejon facilis dum kaj iom



JÉRÉMIE SABIYUMVA

Dum mankas loĝejoj por ordinaraj burundanoj, ministroj kaj aliaj konstruigas luksajn hejmojn.

post la koloniisma epoko. Tamen, post sendependiĝo, sinsekvaj registaroj neglektis konstrui novajn hejmojn. Antaŭ 1973 la ŝtato ne nur loĝigis ŝtatfunkciulojn kontraŭ eta sumo, sed ankaŭ bone ekipis la domojn. Poste, tamen, altiĝis la kostoj por prizorgi loĝejojn tiajn, kaj la ŝtato perdis interese.

Nuntempe altaj kostoj kaj malaltaj salajroj ebligas al nur malmultaj ŝtatfunkciuloj profiti de tiel nomata loĝado-kredito por akiri hejmon. En 1990 81 % de la funkciuloj petis kredito tian; en 2008 nur 8 %.

Kultiveblaj kampoj

En 2007 la registaro lanĉis novan iniciaton: „loĝado kaj urbo”. Tiel ĝi celas disponigi teron por novaj domoj – entute 26 000 jare. Tamen oni protestis, ke tiel malaperos kultiveblaj kampoj. Kreskos do malsato: pli bone, eble, ripari kaj plibonigi ekzistantajn loĝejojn ol konstrui novajn.

Cetere notindas, ke kelkaj ministroj kaj parlamentanoj konstruigas multekostajn domojn pagitajn per korupto kaj ŝtelado.

Laŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj „ĉiu havas rajton je vivnivele adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio, inkluzive de nutraĵo, vestaĵoj, loĝejo kaj medicina prizorgo kaj necesaj sociaj servoj”. Ŝajne ankoraŭ ne en Burundo.

Jérémie SABIYUMVA



EL CUNYU

En 2007 la registaro lanĉis novan iniciaton: „loĝado kaj urbo”. Tiel ĝi celas disponigi teron por novaj domoj – entute 26 000 jare. Tamen oni protestis, ke tiel malaperos kultiveblaj kampoj.

NEPALO

Komunistoj sen komuneco

Nepalo finfine fariĝis respubliko kun komunista registaro. Reĝo Gyanendra forlasis sian palacon en 2008 kaj nun loĝas en Nepalo kiel ordinara popolano. Lia filo forlasis la landon por ekloĝi en Singapuro.

Post la proklamo pri la respubliko nepalanoj esperis pri pli bonaj tempoj, sed ne multo ŝanĝiĝis. Ekzemple, la reĝa palaco fariĝos parte ministrejo pri eksterlandaj aferoj kaj parte muzeo, sed pri ĉi-lastata ankoraŭ atendas nepalanoj. Same ankoraŭ posedas la ribelintoj siajn armilojn.

La registaro konsistas el membroj de diversaj komunistaj partioj nepalaj. Oni ne scias, kiom da komunistaj partioj ekzistas en la lando. Ili fondiĝis rezulte de diversaj splitiĝoj, post kiam dum la reĝa epoko tiu aŭ alia partio estis malpermesata.

Ĝenerala sekretario

Jen la partioj interkonsentas kaj unuiĝas, jen ili malkonsentas kaj denove disiĝas. Multaj opinias, ke la partioj unuiĝu, sed ĉiu partio taksas sin la vera komunista partio kaj rifuzas cedi al aliaj. Pri politikaj aferoj ili pli-malpli interkonsentas, sed ne pri tiu, kiu fariĝos la ĝenerala sekretario de unuiĝinta partio.

Do malgraŭ tio, ke 60 % de la popolo voĉdonis por la diversaj komunistaj partioj, ili malbone regas kaj malkomuniste laboras. Restas do la demando, ĉu iam la partioj sukcese kaj definitive unuiĝos.

Cetere malaprobis la komunistojn la usona registaro. Pli kaj pli intervenas en nepala politiko la ambasadoroj de Usono kaj de Barato. Sed malgraŭ ĉio la nepala popolo pli kaj pli favoras komunistojn.

Navin Lal SHRESTHA/pg



Reĝo Gyanendra forlasis sian palacon kaj nun loĝas en Nepalo kiel ordinara popolano.

POLLANDO

Centra demando

Reprezentantoj de la urbo Zamość deklaras, ke centro pri ekzilitoj estu konstruita en orienta Pollando. Dum la dua mondmilito la regiono de Zamość (konata kiel Zamojszczyzna) tiom spertis pri ekziloj, ke nepre tie staru la centro.

Leteris la iniciatintoj de la projekto al la pola prezidanto Lech Kaczyński: „Ni havas la moralan rajton admoni pri nia pola versio de historio. Ĉi tie en la regiono de Zamość en la jaroj 1942-1943 estis ekzilitaj el siaj hejmoj pli ol 40 000 homoj.”

En la centro troviĝu fotoj, memoraĵoj kaj aliaj dokumentoj pri poloj forpelitaj el pli ol 120 vilaĝoj en la regionoj. Jerzy Zacharow, unu el la iniciatintoj, diris: „La centro estu komprenata kiel loko de eŭropa memoro. Ĝi estu komuna verko de nia generacio, konstruita kiel monumento omaĝe al niaj gepatroj.”

Germanigado

La ekziloj ligiĝis kun la germanigado de orientaj teritorioj de Pollando kaj aliaj regionoj por krei t.n. vivospacon (germane: *Lebensraum*). Ĉirkaŭ 50 milionoj da slavoj, precipe poloj, rusoj, belorusoj kaj ukrainoj, devis esti transloĝigitaj aŭ ekstermitaj.

Pro tio aktivuloj kiel Zacharow kontraŭas ekzilito-centron en Berlino. „Germanoj morale ne rajtas konstrui tie Eŭropan Centron pri Forpelitoj”, li diris.

Stanisław ŚMIGIELSKI

PATROJ

Sol-vata



CITYANIMALS

Malgraŭ la malbona vetero kolektiĝis en la ukraina ĉefurbo centoj da viroj – sol-patroj, kiuj postulis, ke la instancoj ilin atentu. Kial, ili demandis, sol-patrinoj havu pli da rajtoj ol sol-patroj? Cetere ili atentigis, ke la prezidanto aperigis apartan ukazon favore al speciala tago – la tago de la patro. Se la parlamento aprobas la tagon, ĝi okazos verŝajne la 27an de oktobro.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

ALBANIO

Tragedio fundamenta

Mortis tri virinoj, kaj vundiĝis kelkdeko da aliaj homoj, kiam kolapsis parto de pluretaĝa domo en la albana urbo Gjirokaŝter [ĝirokaster]. Apude oni estis fosanta fundamentojn por alia pluretaĝa konstruaĵo, kaj ŝajnas, ke pro avideco sekurecon oni neglektis. Povas esti, ke pro korupto la koncernaj instancoj ne sufiĉe atentis la danĝeron.

La tragedio havis grandan enlandan eĥon, ĉar jam okazis similaj katastrofoj. Dum la polico naŭ suspektatajn respondeculojn arestis, la ĉefministro ordonis reviziadon de ĉiuj permesiloj de konstrufirmaoj. Publika opinio kondamnas la avidecon de tiuj ĉi firmaoj, kiuj aktuale multon enspezas pro floranta domkonstruado.

Bardhyl SELIMI

UKRAINIO

Interrete – inter ni



HTTP://WWW.ZAVOD.NET/IMAGES/NEWS/FULL/ARTICLEIMAGE_2_15919.JPG

La prezidanto de Ukrainio, Viktor Juŝĉenko, respondis plurajn interretajn demandojn senditajn de ordinaraj civitanoj. La plej populara demando, de proksimume 85 000 ukrainoj, estis: „Kiom ni, simplaj homoj, pagu al vi kaj al ĉiuj deputitoj de la supera parlamento, por ke vi ĉiuj por ĉiam forlasu nian landon?” Responde la prezidanto opiniis, ke la demando devenis ne de ukrainoj kaj tiuj celis simple provoki. Li aldonis, iom nebule: „Ni devas plibonigi la rilatojn inter la potenculoj kaj la simplaj homoj.”

Dmitrij CIBULEVSKIJ

BURUNDO

Kiam naskiĝos virinaj rajtoj?

Post 13-jara interetna milito, en kiu mortis centmiloj da homoj, ekpensis burundanoj, ke venos trankvilo. Tamen, dum ĉesis la „milita” milito, komenciĝis milito pri homaj rajtoj, kiu implicas la evoluon de tiu ĉi mondoparto.

En aparte malavantaĝa situacio trovas sin virinoj. Eble pro tradicio, kiu potencigas virojn, edzinojn, kiuj naskas knabinojn, estas iufoje torturataj aŭ eĉ murdataj de siaj edzoj.

Ekzemple antaŭ nelonge tial mortis Mélanie Inakanyana kaj Béatrice Niyondavyi. La okazoj memorigas pri Francine Nijimbere, juna virino, al kiu ŝia edzo fortranĉis la brakojn kiel puno, ke ŝi naskis nur knabinojn. Tiu ĉi virino estas unu el malmultaj, kiuj plendis: la edzo estis enprizonigita.

Vilaĝoj

Precipe en vilaĝoj atencoj tiaj restas kaŝitaj antaŭ lokaj administrantoj, parte pro timo kaj parte pro tio, ke burundaj kutimoj malpermesas al virinoj plendi kontraŭ siaj edzoj. Pro tio estas mortigitaj multaj bebinoj.

Aliflanke, pro la samaj kutimoj, knaboj estas bone protektataj. Ili estas malsame edukataj, ol knabinoj: knaboj lernas, kiel uzi armilojn, prizorgi bestojn kaj konstrui domojn; knabinoj lernas, kiel balai, lavi vestaĵojn, kuiri kaj prizorgi infanojn. Senknabaj familioj malaperas, ĉar iuj edzoj forlasas edzinojn, kiuj ne naskas knabojn, por serĉi alian virinon, kiu donos sopiratan filon.

Bofamilio

Pli ol 90 % da burundanoj vivas de

terkultivado, la tero estas ilia sola „kapitalo”. Knabinoj tamen ne rajtas heredi la havaĵon de siaj gepatroj, kaj do la tero estas nur por knaboj, kiuj restas apud la gepatroj ĝis la morto. Knabinoj ne longe restas kun siaj gepatroj pro edziniĝo: ili ricevas ne de sia propra familio, sed de la bofamilio.

Multo estas farita por komprenigi al viroj, ke edzinoj ne respondecas pri la sekso de siaj idoj. Oni diras, ke virino estas kvazaŭ tero, kaj viro kvazaŭ kultivisto: oni do rikoltas, kion oni semis. La registaro kaj aliaj instancoj klopodas klarigi al viroj, ke ankaŭ ili respondecas pri la sekso de la bebo, sed en lando, kie ĉirkaŭ 90 % de la popolo scipovas nek legi, nek skribi, ne eblas optimismi pri la rezultoj.

Jérémie SABUYUMVA



Pli ol 90 % da burundanoj vivas de terkultivado

REKLAMADO

Aŭtobusa di-alogo

Eblas paroli pri „la batalo de la reklamoj”, en kiu sekularistoj kaj religiistoj provas prezenti al la publiko siajn kontraŭajn starpunktojn.

Ĉio komenciĝis pasintjare, kiam la Brita Humanisma Asocio surpriziĝis, altirante al si oble pli da mono ol atendita por lanĉi reklamon: „Verŝajne ne ekzistas Dio. Do ne maltrankviliĝu kaj ĝuu vian vivon.” La asocio planis aperigi la reklamon sur la flankoj de londonaj aŭtobusoj. Pro vasta financa subteno por la reklamoj eblis tiel priaŭti aŭtobusojn en aliaj britaj urboj.

La humanisma mesaĝo eĉ pli disvastiĝis, kiam amaskomunikiloj amuzite raportis, ke en la sud-angla urbo Southampton religiema ŝoforo rifuzis veturigi buson portantan la – laŭ li – ofendan reklamon.

Eĉ pli ofenda

Tamen eĉ pli ofenda montris sin replika reklamo lanĉita de la tiel nomata Kristana Partio. Ĝia aŭtobusa reklamo tekstis: „Tutcerte ekzistas Dio. Do aliĝu al la Kristana Partio kaj ĝuu vian vivon.”

THERE'S NO GOD
HOW STOP WORRYING
AND ENJOY YOUR LIFE

„Ne ekzistas Dio. Do ne maltrankviliĝu kaj ĝuu vian vivon.”

Kontraŭ la kristana reklamo protestis pli ol mil britoj (kaj la cifero daŭre kreskas). Tiel la reklamo fariĝis la kvara plej kritikata en la historio de la brita reklamado-industrio. Pivotis la protestoj ĉirkaŭ la aserto, ke „tutcerte” ekzistas io, pri kio certeco neniel eblas. Kont-raste la humanisma reklamo altiris nur 326 protestojn.

Malgraŭ la postuloj de tiuj, kiuj volas, ke unu aŭ alia reklamo estu retirita, la kontrol-instanco respondeca pri reklamado en Britio decidis permesi ambaŭ. La du reklamoj prezentas nur opiniojn, argumentis la instanco – konscia, verŝajne, ke en esence sekulara Britio ekzistas aferoj pli gravaj ol aŭtobusa reklamo-batalo pri kredo aŭ nekredo.

Paul GUBBINS



„Tutcerte ekzistas Dio. Do aliĝu al la Kristana Partio kaj ĝuu vian vivon.”

ALBANIO

Ĉiamas iama amo



CARLO NINORA

Antaŭ nelonge divorcis juna paro el la suda ĉemara urbo Vlora. Poste ambaŭ komencis serĉi novan partneron per interretaj babilejoj. Ili prezentis sin en la elektronika medio per kaŝnomoj kaj tiumaniere virtuale renkontiĝis. Sekvis vid-al-vida renkontiĝo – kaj kiom grandis la surprizo, kiam la iamaj geedzoj denove sin vidis. Reflamiĝis amo kaj reunuiĝis la paro.

Bardhyl SELIMI

ALBANIO

Pli amu ...

Amon al la patrujo esprimis albanoj eksterlande loĝantaj per granda spektaklo. Kvarfoje estis prezentata „Ni amu pli multe Albanion”, en kiu partoprenis i.a. la hollywooda aktoro kaj humoristo Jim Belushi. La ordenon „Honoro de la nacio” prezentis al li la albana prezidanto Bamir Topi. Partoprenis ankaŭ Et-hem Ramadani, el Slovenio, kiu finance subtenis ne nur artistojn, sed ankaŭ familiojn afliktitajn de eksplodo ĉe la Gerdec-municiejo.

Bardhyl SELIMI

Lernantoj senesperaj

En Japanio la ekonomia regreso gravas, kaj nun malbone efikas sur lernejoj. Ekzemple, en elementaj kaj mezaj lernejoj en gubernio Tottori multiĝas lernantoj nekapablaj pagi siajn tagmanĝojn. Postulante pagon, instruistoj vizitas familiojn, sed trovas, ke tiuj ne povas pagi pro maldungiĝo kaj/aŭ eksedziĝo. Nuntempe multaj lernejestroj kaj instruistoj pagas por siaj lernantoj.

Mankas al „malfacilaj” familioj subvencioj, laŭ s-ino Abe Aja, aŭtoro de la libro *Malriĉeco de geknaboj*. El ĉiuj 17 geknaboj unu kreskas en senpatra familio: tial, laŭ la libro, tiaj geknaboj riskas esti nesufiĉe edukitaj. Naskiĝas ankaŭ

timo, ke la nuna ekonomia situacio tiel severas, precipe por solaj patrinoj, ke multiĝos senhejmaj patrinoj kun gefiloj.

Samklasanoj

Laŭokazaj laboristoj ofte ŝanĝas sian laborlokon, sekve sian loĝlokon. Se ili havas gefilojn, ankaŭ tiuj devas ŝanĝi sian lernejon sen sufiĉe da tempo por edukiĝi kaj amikiĝi kun samklasanoj.

Pli ol 97 % da 15-jaraĝaj lernantoj eniras superan mezlernejon. Se ili tie ne finstudas, malfacilas trovi laborlokon. Ili ne povos akiri diplomojn por akiri

pli bonajn postenojn. En 2008 72 854 lernantoj forlasis superajn mezlernejojn meze de sia lernado.

Diplomoj

La ĵurnalo *Asahi* raportis pri lernantoj en gubernia supera mezlernejo. Unua-jara klaso pretis akcepti 40 lernantojn. Fakte nur 24 eniris kaj nun restas nur 15. En februaro okazis kursfina ceremonio, kiun ĉeestis 121 el 210 akceptitoj. Kien iris la forlasintoj?

Oni ĝenerale opinias, ke la japana socio garantias egalecon al ĉiuj. Ekzistas nek kasto, nek sociaj katenoj, nek klasoj. Ĉiuj superaj mezlernejoj kaj universitatoj estas malfermitaj al ĉiuj kandidatoj. Se tiuj sukcesas en la enir-ekzameno, havante sufiĉe da mono kaj kapablo, ili rajtas lerni kaj studi en iu ajn loko. Kiam Japanio estis ekonomie prospera kaj ĉiuj relative riĉaj, tio veris.

Malklereco

Nun atakas multajn familiojn malriĉeco, tiel ke iuj lernantoj ne povas lerni eĉ en supera mezlernejo. Por tiuj, iri al universitato estas ekster la supozo. Nun malriĉeco de la familioj kaŭzas al iliaj gefiloj malklerecon, kaj sekve perdon de espero, kiu kaŭzas pli da malriĉeco, kaj pli kaj pli da aliaj malbonaĵoj.

Gravas, se multaj junuloj devos malriĉe, malklere kaj senespere vivi. Tio damaĝas ne nur tiujn junulojn, sed ankaŭ Japanion. Malgraŭ malbona ekonomio, Japanio ankoraŭ havas grandan potencon. Savi gejunulojn estas la plej granda devo de la registaro kaj de la socio.

HORI Jasuo



Nun atakas multajn familiojn malriĉeco, tiel ke iuj lernantoj ne povas lerni eĉ en supera mezlernejo.

Ekonomio ŝrumpas, sed kompanioj prosperas

Pro la ekonomia regreso, la merkato malvarmiĝas. Aŭtomobiloj tute ne vendiĝas, kaj multaj laboristoj estas maldungitaj. Grandaj vendejoj suferas pro malbona vendado, kaj ili serĉas diversajn rimedojn por pluvivi.

Laŭ la ĵurnalo *Asahi* de la 21a de februaro 2009, al la demando „ĉu vi aĉetis multekostaĵon lastatempe?“, 65 % de la enketitaj 10 521 homoj respondis „ne“. La kialoj estis „ne estas aĵoj, kiujn mi volas aĉeti“ (3225), „mi ne volas elspezi monon“ (1716), „mi estas maltrankvila pro mia estonteco“ (966), „mia salajro malmultiĝis“ (467). 362 homoj menciis aliajn kialojn. Jam abundas aĵoj en la japanaj hejmoj. Pro la ekonomia regreso, ili estas pli singarde-maj kaj tenas la monujon fermita.

Eĉ nun iuj kompanioj profitegas

UNIQLO (www.uniqlo.com) ofertas ĉiutagajn vestaĵojn. Tiu ĉi kompanio unuan fojon malfermis vendejon en Hiroŝimo en 1984. Ĝi prosperas, ekvivalente vestaĵoj el nova materialo nomata *heat-tech* (kiu supozeble signifas varm-teknologio). Ĝi havas multajn branĉojn enlande kaj ankaŭ en Londono, Honkongo, Ŝanhajo kaj Seulo. Komence de la jaro 2009 *UNIQLO* prognozis profiton de 620 miliardoj da enoj, sed lastatempe ĝi ŝanĝis la prognozon pli alten al 627 miliardoj. La kompaniestro Janai Tadaŝi fariĝis en 2008 la plej riĉa homo en Japanio, posedante 570 miliardojn da enoj.

Japana *McDonald's* lastan jaron profitis plej multe en sia historio. Ĝi vendis 100-enan hamburgeron kaj 120-enan kafon kaj altiris multajn klientojn. *Nintendo*, kiu vendas elektronikajn ludilojn tutmonde, ankaŭ profitas multe.

Oni analizis la kialojn de la prosperiĝo de tiuj kompanioj. La ĉefa kialo estas, ke ili dependas de la enlanda merkato. Multaj japanaj industrioj dependas de eksporto, multe al Usono. Tial, kiam Usono ternas, Japanio malvarmumas. Ĉi-foje Usono estas serioze malsana, do Japanio estas mortanta. Tamen la supraj kompanioj precipe dependas de japanaj konsumantoj, do la influo de eksterlanda regreso estas malpli granda.

Alia kialo estas, ke japanoj serĉas pli malmultekostajn kaj pli unikajn aĵojn kaj restas hejme. La vestaĵoj, kiujn *UNIQLO* vendas, estas novmaterialaj, unikaj kaj malmultekostaj. Hamburgerojn kaj kafojn de *McDonald's* eĉ malriĉaj homoj povas aĉeti, kaj en la malbona ekonomio eĉ pli da homoj volas aĉeti tiajn malmultekostajn manĝaĵojn. Ili emas resti hejme; pro tio elektronikaj ludiloj bone vendiĝas kiel etaj distraĵoj. Homoj estas homoj. Eĉ en la ekonomia regreso ili volas vivi homece, kaj por tio ili serĉas en la socio tion, kio kontentigas ilian malgrandan feliĉon.

Hori Jasuo



UNIQLO ofertas ĉiutagajn vestaĵojn kaj bonfartas malgraŭ la krizo.



Energiaj maŝinoj

Kubon varmigas trankvilaj mar-
ondoĵ de la Kariba Maro: plaĝoj
kaj suno ĝueblas dum la tuta jaro.
Sed la varmeco estigas alarmon por ku-
banoj.

La altaj temperaturoj de la maroj,
kiuj ĉirkaŭas la kuban insulon, tre favo-
ras ciklonojn. El ili povas naskiĝi fortaj
kaj danĝeraj uraganoj, enormaj ventosis-
temoj, kiuj kun abunda pluvado turniĝas
ĉirkaŭ regiono de malalta premo. Ĉe la
norda hemisfero tiu turnomovo okazas
maldekstren, laŭ la kontraŭa direkto de
la horloĝmontriloj. Por la scienca komu-
numo koni tiujn tiel nomatajn energiajn
maŝinojn prezentas grandan defion.

Fakuloj klasifikas ciklonojn laŭ gra-
doj de rapideco de daŭraj ventoj. La kon-
cerna fenomeno ricevas unu el la jenaj
kategorioj: tropika depresio, kun ventoj
rapidaj ĝis 63 km/h; tropika ŝtormo, de
63 ĝis 117 km/h; kaj uragano, kun ventoj
pli rapidaj ol 118 km/h.

Sanktulo-nomoj

Kiam ciklono havas kategorion de
tropika ŝtormo, ĝi ricevas nomon. Tiu ĉi
kutimo aplikiĝas jam de multaj jarcentoj.
Dum la 18a kaj 19a jarcentoj kaj komen-
ce de la 20a oni uzis sanktulo-nomojn,
kaj dum la dua mondmilito alfabetan
kodon. En 1953 la Usona Meteologia
Servo komencis uzi virinajn nomojn laŭ
alfabeta ordo. Viraj nomoj alterne kun
virinaj aperis en 1978 por nomi tropi-
kajn ŝtormojn, kiuj estiĝis en la Nord-
Pacifika Oceano. En 1979 tiu ĉi metodo
nomi la fenomenojn komencis aplikiĝi
en Atlantiko kaj Golfo de Meksiko.

Nuntempe tiuj nomoj estas elekti-
taj en internaciaj kunsidoj de la Monda
Organizaĵo pri Meteorologio. La literoj Q,
U, X, Y kaj Z ne estas uzataj por nomi
uraganojn en Atlantiko, ĉar malmultas

nomoj komenciĝantaj per tiuj literoj.
Kiam uragano tre severas, kaj estigas
multajn homajn perdojn kaj ekonomiajn
damaĝojn, ĝia nomo estas forigita de la
listo.

Ventorapideco

En 1997 komencis aplikiĝi en Kubo
la skalo Saffir-Simpson, kreita en 1969
de la inĝeniero Herbert Saffir kaj de la
direktoro de la usona Landa Uragana
Centro, Bob Simpson. Tiu skalo ebligas
per numero kategoriigi uraganojn preci-
pe laŭ la ventorapideco. Tiel la loĝantoj
de regionoj en risiko povas koni ĝian
grandecon.

La vivo de uragano daŭras sep ĝis
dek tagojn, sed en 1971 la uragano Gin-
ger travivis kvar semajnojn.

Almenaŭ en la kariba regiono, la plej
favora periodo por la formiĝo de ciklo-
noj estas de la 1a de junio ĝis la 30a de
novembro, kaj la plej aktiva tempo en



*La altaj temperaturoj de la maroj, kiuj
ĉirkaŭas la kuban insulon, tre favoras
ciklonojn.*



*Urboj proksimaj al la marbordo estis
grandparte detruitaj.*

Kubo estas inter la 21a de septembro kaj
la 20a de oktobro. Tion pravas la pluraj
uraganoj, kiuj trairis la insulon, kaj inter
ili elstaras la du plej intensaj en la kuba
historio. Ili estas la ŝtormo el kategorio 5
San Francisco de Borja, de la 10a ĝis la
11a de oktobro 1846, en la urbo Havano,
kaj la sennoma samkategoria uragano,
ne komparebla kun pasintaj, kiu la 19an
de oktobro 1924 troviĝis okcidente de
Pinar del Río.

Inundoj

Uraganoj estigas ne nur ekonomiajn
perdojn. Ofte akompanas ilin morto. En
1791 la ŝtormo Barreto, kun kategorio
1, mortigis proksimume 3000 homojn
en urbo Havano, precipe pro inundoj;
en 1870 la uragano el 3a kategorio San
Marcos damaĝis provincon Matanzas
kaj mortigis proksimume 800 homojn,
ankaŭ pro inundoj; en 1926 uragano,
kun kategorio 4, mortigis en Havano
600 homojn pro fortaj ventoj, pluvado
kaj grandaj marondoj. Ĝis 1963 du pliaj
ŝtormoj mortigis pli ol 2000 viktimojn.

En la jaro 2008 du notinde danĝeraj
uraganoj damaĝis Kubon: ili estis Gustav
kaj Ike. La 30an de aŭgusto, per ventoj
rapidaj je 340 km/h, Gustav kaŭzis mul-
tajn detruojn en la okcidenta regiono de
la insulo, precipe en la insula municipo
Isla de la Juventud kaj en la provinco
Pinar del Río. Ok tagojn poste, la 7an
de septembro, aperis Ike, kiu atingis ka-
tegorion 3, kun ventoj de 195 km/h. Ĝi
eniris Kubon ĉe la norda marbordo de la
provinco Holguín, kaj eliris tra la suda
strando de la centra provinco Ciego de
Ávila. Moviĝinte okcidenten dum kelkaj

horoj, ĝi denove surteriĝis en la provinco Pinar del Río.

Montohava

La uragano Ike formiĝis en septembro 2008, kaj ĝi estis speciala. Enirinte la landon, uragano ĝenerale malfortiĝas, ĉar la energio kaptita sur la maro perdiĝas pro la ventofroto sur la tera surfaco, des pli se la regiono estas montohava. Kvan-kam Ike trapasis Kubon en la distanco de multaj kilometroj, ĝi ne malfortiĝis, sed surmariĝis kun kategorio 1.

La damaĝoj estis grandegaj en la tuta insulo. La fortaj ventoj kaj abunda plu-vado damaĝis diverstipajn konstruaĵojn: 444 000 domojn, el kiuj pli ol 63 000 entute detruigis; 3802 lernejojn; 1284 malsanulejojn. La telefona kaj elektra sistemoj ricevis fortan baton kaj falintaj arboj kaj inundoj blokis la vojojn. La kalkulitaj ekonomiaj perdoj sumiĝis je ĉirkaŭ kvin miliardoj da dolaroj.

Rekordo

La interesa kaj ĉagrena detalo en tiu ĉi uragana periodo estas, ke neniam antaŭe du grandaj ŝtormoj sinsekve trairis Kubon kun interspaco de nur ok

tagoj. Tio estas rekordo: antaŭe la plej mallonga tempo estis 15 tagoj, kiam du samtipaj uraganoj eniris la teritorion en 1948.

La jardeko 2000-2010 fariĝis la plej aktiva kun la alveno de la uraganoj Gustav kaj Ike, kiuj aldoniĝis al la grupo de la terura Michelle, en novembro 2001; Charley kaj Iván, en aŭgusto kaj septembro de 2004 respektive; kaj Dennis en julio 2005. En la daŭro de ok jaroj ses uraganoj endanĝerigis la insulon. Kompare kun aliaj jardekoj, tio estas rekordo. Ekzemple en la periodo 1909-1952, kiu estis la plej aktiva en la 20a jarcento, formiĝis nur 12 fortaj ŝtormoj,

kaj en la periodo 1844-1888 nur ok.

Abundas diroj pri la rilato inter la tera varmigo kaj la plimultiĝo kaj plioftiĝo de tiuj fenomenoj. Sendube la varmeco de la supraj akvoj de la maroj estas grava faktoro por la estiĝo de uraganoj, sed ĝi ne estas la unusola.

Yoandra Isabel RODRÍGUEZ LABRADA



CODIGO



Falintaj arboj multloke baris vojojn.



Satelita foto de la momento, kiam la uragano Ike troviĝis en la centro de Kubo.



Inundoj estis unu el la plej danĝeraj riskoj.



Dum kelkaj horoj, kaj ankaŭ tagoj, urboj paraliziĝis pro la amasiĝinta akvo.



La marondoj estis notinde altaj, kaj en kelkaj lokoj ili havis altecon de 12-etaĝa konstruaĵo.

Kia lingva ekologio por daŭripova evoluo?



La realo estas, ke oni apenaŭ havas proksimuman scion pri la nombro de lingvoj ankoraŭ parolataj en la kontinento.

Sendube la amerika kontinento estas granda lingva mozaiko kaj tial multaj prilingvaj fakuloj sin demandas kiel administri tiun ĉi multlingvismon. Kiajn kriteriojn sekvi por garantii konservadon de la amerika lingva ekologio ene de integriĝinta spaco? Kaj konsekvence, al kiaspeca integriĝo ni devas aliĝi: ĉu al inkluziva aŭ ekskluda? Oni devas scii, ĉu niaokaze plurlingvismo konsistigas faktoron evolupovan aŭ retroiran.

La fakto estas, ke multaj fakuloj daŭre esploras kaj verkas pri tiu ĉi temo kun la celo konsciigi la civitanaron pri la reala lingva malekvilibro, kiu damaĝas la lingvan ekologion de tiom vasta regiono.

Tiurilate oni devas atenti, ke „lingvo akompanas imperion” laŭ la esprimo de Antonio de Nebrija [antónjo de nebríja], aŭtoro de la unua gramatiko de la kastilia lingvo en siaj dediĉaj notoj al la Katolikaj Gereĝoj en la jaro 1492. Por

granda parto de Ameriko, kies integriĝo al la okcidenta mondo tiam komenciĝis, tiu frazo estas ligita al la enrompo de la kastilia lingvo, kiu kaŭzis la unuan grandan skismon en iliajn hejmojn. Ankaŭ la lingvoj angla, franca kaj portugala, kiuj akompanis siajn respektivajn imperiojn, produktis aliajn skismojn en la regionoj, kie ili altrudiĝis.

Nuntempe tiuj kvar lingvoj, klasifikitaj inter la plej parolataj en la mondo, apartenas al politikaj institucioj forte strukturitaj kaj konsistigas oficialajn lingvojn en internaciaj organizaĵoj. Aprioro, ne ekzistus kialo por pridubigi kvarlingvan projekton de kontinenta integriĝo, tamen, ĉu tiuj lingvoj per si mem spegulas la kulturen kaj lingvan profilon de Ameriko?

La realo estas, ke oni apenaŭ havas proksimuman scion pri la nombro de lingvoj ankoraŭ parolataj en la kontinento. Aktualaj raportoj kalkulas, ke estas

proksimume 1500 aŭ 2000 lingvoj, klasigitaj en 20 lingvistikajn familiojn, kiuj prezentas riĉan genetikan kaj tipologian diversecon kaj estas uzataj en la jenaj regionoj: Nord-Ameriko (de Alasko ĝis centra Meksiko), Mez-Ameriko (inter centra Meksiko kaj Nikaragvo), Karibio kaj Sud-Ameriko.

La situacio de la lingvoj en la tri menciitaj geografiaj regionoj prezentas trajtojn klare diferencajn, kiuj inkluzivas, jen danĝeron pri evidenta malapero, jen subitan kreskon. Oni povas tamen diri, ke la plimulto de la indianaj lingvoj, forte markitaj de la stigmo de longa koloniado, trovas sin reduktitaj ĝis la kategorio de minoritataj lingvoj, kondamnitaj al socia periferio de ties parolantoj, diskriminaciataj, aŭ en plej bonaj okazoj, transformitaj en ekzotikaĵojn, forajn eĥojn de pasinteco konkerita kaj venkita.

Maritza GUTIÉRREZ

Interkontinenta ligo

Ĉu vi scias, kio ligas du malproksimajn landojn: Venezuelon kaj Rusion? Jes, antaŭ nelonge Venezuelon oficiale vizitis la prezidanto de Rusio Dmitrij Medvedev, kaj venis militŝiparo rusia por komunaj manovroj. Sed fakte ilin unuigas unu antikva vorto.

Verŝajne multaj kleraj kaj eruditaj homoj scias, ke la landnomo „*Venezuela*” devenas de „*Venezia*” (Venecio) kaj signifas „eta Venecio”.

Siavice „*Venezia*” kaj la nomo de la regiono itala *Veneto* devenas de la gento venedoj, kiuj migris ĉi tien ankoraŭ pli frue, ol postaj slavaj gentoj. Vidu la mapon de Balkanoj: ĉi tien venis slavo el

nordo, el nunaj teritorioj de Pollando, Ĉeĥio, Slovakio. Ĝis nun ĉi tie, en Balkanoj, vivas slovenoj, kroatoj, serboj, bosnianoj, makedonoj, bulgaroj, montenegranoj: ĉiuj slavaj popoloj. Venedoj vivis multe pli norde, apud la nunaj Estonio kaj Finnlando.

Ĝis nun estonoj nomas Rusion „*Vene-maa*”, „*vene*” signifas „rusa”, kaj „*maa*” signifas „lando”, ankaŭ finnoj nomas simile rusojn kaj la landon „*Venäjää*”.

Multaj gentoj tiam migris tra Eŭropo kaj Azio. Interalie enciklopedio diras:

1. Venetoj estas grupo da gentoj loĝintaj antikve en la norda marbordo de Adriatiko, nord-oriente de la rivero Po.

2. En verkoj de romiaj kaj bizancaj historiistoj venetoj (pli ofte venedoj, vendoj) estas la okcidenta branĉo de slavaj gentoj.

Interalie, la sama enciklopedio diras, ke la veneta lingvo estas aparta branĉo de la hindeŭropa familio. Ekzistas pli ol 250 skribaj atestoj (dediĉsurskriboj kaj tomboskriboj), parte en adaptita nordetruska alfabeto kun aldono de grekaj signoj, parte latinskribaj (la 6a-1a jarcentoj a.K.).

Prosperon al vi, Veneto kaj Venezuelo!

Sergeo JURJIC



MORECH

Interkontinenta lingva ligo: Veneto kaj Venezuelo.



SPANNER DAN

Panoramo de la Nerona Romo

Anna Löwenstein



MORTO de ARTISTO

Pri Nerono, la imperiestro, mi sciis – aŭ memoris – nur, ke li bruligis Romon. La verko de Anna Löwenstein diras multe pli, kaj donas detalojn absolute interesajn. Ŝi prezentas al ni aliajn facetojn de tiu imperiestro: liajn talentojn, lian karakteron.

La rakontanto estas Prokulpio, aktoro kaj amiko de Nerono. Ni renkontas Lukanon, Oktavian kaj Senekon. Tiel Anna Löwenstein situigas por ni en la kunteksto de la historio verkistojn de (kaj personojn el) jamaj tradukaĵoj en Esperanto. La du amikoj ie eĉ komentas dirojn de Seneko. Tra ili ŝi transdonas al ni kulturajn citaĵojn, interalie kelkajn versojn. Scenoj – kruelaj aŭ idiliaj – estas jen alude tuŝataj, jen ankaŭ perage kaj detale. Ĉu la „publiko” finfine maturiĝis,

La romano estas bone konstruita...

**Pli kaj pli,
laŭ la plulegado,
la fabulo montriĝas
trapensita, bone planita
en funkcio
de la fono historia.**

mi miris, – ke oni povas priskribi la morojn de Romo laŭvere kaj laŭfakte? Eĉ se lerta aludo ofte sufiĉas.

Fine de la libro ni trovas liston de 172 roluloj, el kiuj 67 vere ekzistis. (Eĉ pliaj nomoj menciigās en la teksto, sed de homoj ne rolantaj.) Tiu nombro ne timigu. Ni tiun „amason” ne rimarkas en la 600-paĝa verko. Ofte Anna Löwenstein montras karakterfacetojn, alude mencias etajn flankojn de roluloj. Ni konstatas: funde, homoj en 2000 jaroj ne ŝanĝiĝis.

La romano estas bone konstruita: ok partoj kun numeritaj subdividoj. Pli kaj pli, laŭ la plulegado, la fabulo montriĝas trapensita, bone planita en funkcio de la fono historia. Lertaĵo estas alporti iujn sciigojn postprokraste-ĝustatempe. Fojfoje tre subtila humuro subsonas en iu frazo. Konversacioj iĝas pli kaj pli naturaj.

Kiam ni prijuĝas legitan libron, ni serĉas kriteriojn. Ĉe tio, por ni mem estas tute nature, – malgraŭ averto – ke ni faras komparaĵojn. Kaj mi pensas ne sole pri konfrontado de la du romanoj de la

recenzata aŭtorino. Neeviteble kaj ne-rezisteble, niaj pensoj iras al du – ankaŭ tradukaĵoj – klasikaj verkoj de nia kulturo: *La faraono* de Prus (trad. Kabe) kaj *Cezaro* de Jeluŝiĉ (trad. Ivo Rotkviĉ, lingvovirtuozo). En nia menso poste tuj aperas aliaj nomoj; kaj titoloj de „historiaj romanoj” originalaj kaj eble iugrade pli fikciaj: unuflanke Trevor Steele (*Sed nur fragmento* kaj la brila *Neniu ajn papilio*), aliflanke Spomenka Ŝtimec (*Tilla* kaj *Hodler en Mostar*, se ne paroli pri la delikata *Tena*). Ŝtimec revivigas ekzistantajn personojn, Steele metas siajn rolulojn en iun historian periodon. Zagrebo ne estas Romo. Aŭstralio ne estas Eŭropo. Sed vidu: rekta pensado en iu lingvo certe rezultigas malsaman lingvaĵon ol traduko al tiu lingvo. Arto, ĉi-okaze verkado, estas afero de ekvilibro inter multaj prikalkulindaĵoj kaj ĝia sukceso dependas de diversaj faktoroj. Eblus fari komparon ankaŭ inter *Kaj staros tre alte* (Steele) kaj *La tago kiam Jesuo perfidis Judason* (de Seabra). Ja estus interese, se literaturfakulo analizus kaj komparus certajn romanojn, malkovronte la esencan diferencon.

Sed ni restu ĉe la romanoj de Löwenstein. Kiam ni tiel paŝtas la penson tra nia memoro de legemulo, iĝas klare, ke la ĵus „konsumita” verko estas historia romano, ne beletraĵo. La rakonto progresas kronologie, sen retroiroj, trankvile kaj nekomplike, kaj iom post iom ĝi konstruas koheran totalbildon de la Roma civilizacio, de ĝiaj moroj, de ĝiaj kulturaj pintoj, de la ĉiutaga vivo, de krueleco kaj maljusto, de degenero kaj dekadenco.

Kun siaj tri partoj (Britujo, Romo,

Kristanoj) *La ŝtona urbo* estas pli varia, pli densa, ankaŭ enhave, ol *Morto de artisto*, kiu temas sole pri la vivo en Romo tempe de Nerono. La malvolviĝo de okazaĵoj estas do pli rapida kaj pli kuntrena en la unua libro. En la nuna duoble ampleksa *Morto de artisto* la agado aperas pli modera, minimuma, kaj jen kaj jen apenaŭ vivtenas la intereson, eĉ se plu ĝi tenas la atenton: intensa streĉo for-estas preskaŭ entute. Ĉar mankas lingva vervo, vivo, efervesko; mankas energio, eksperimentemo, pasio. Oficialaj vortoj, jes! Vortoj ligitaj strikte laŭleĝe en frazoj preskribitaj gramatikiste. Nu, bone. Nenia jonglado do. Neniu libera, nelimitita, defia kreado. Teksto iomete enkorsetita, korsetita, sen novismoj. Sed por multaj legantoj tio estos avantaĝo: ke en la lingvaĵo nenio surprizas, nenio frapas, nenio mirigas aŭ konsternas. Tio, tamen, forprenas el la eventuale beletreca valoro, kiu nun kuŝas sole en la alta kvalito de la teksto, vere elstara el gramatika vidpunkto. Jes, nepre: la stilkvalito konsistas precize en tio: la gramatika ĝusteco. Jen elekto de la aŭtoro: gravas precipe la enhavo. Ŝia krea kapablo kuŝas ne en la lingvaĵo, sed en la rakonto, substrato, kiu portu la historian faktaron.

La teksto de *La ŝtona urbo* komenciĝas tuj ege pli densa ol tiu de la nova verko, kies lingvaĵo estas pli facila, pli ordinara, pli komunvorta. Tiu simpleco estas intenca kaj sekvo de evoluo, de polurado, de laboro. La peza libro bezonas subapogan sinon, eble eĉan tablon (aŭ fortikajn brakojn), sed la legaĵo mem estas multe malpli peza. Malgraŭ tio, aŭ ĝuste graŭ ĝi, daŭris pli longe antaŭ ol la fluo de l' rakonto kaptis min. Kelkaj – tamen raraj – paĝoj tanĝas tedon pro similripeta frazado, pro troa reuzo de la samaj vortoj. *La ŝtona urbo* kuntrenas la leganton sed *Morto* entenas tekstopartojn malpli atentotenajn: kvin paĝoj por priskribi konkurson – la vetkuradon de ĉaristoj – estas tro. Same preskaŭ enuigas la priskribo de la preparoj al la imperiestra citroludado en Neapolo. (Ĉu hazardo? Humor-agordo? Sur paĝo 344 ni legas: „Dum la unua peco proksimiĝis al fino, aŭdiĝis jen kaj jen



**Multaj detaloj pri
la „civilizo de la Romanoj”
estas enŝovitaj tra la teksto,
tiel ke, iom post iom,
kvazaŭ senkonscie,
ni absorbas la etoson
de la granda urbo
kaj
la vivo en kaj ĉirkaŭ ĝi.**

tusado kaj flustroj, kaj mi rimarkis, ke maljuna senatano endormiĝis en la unua vico.”) Kelkfoje preterglitas banalaĵoj. Ekzemple: „sur la strato ekstere” (ja ne interne); „la noktoj longiĝis pro la proksimiĝo de la vintro” (evidente). En la rakonta prozo tio kompreneble tute ne ĝenas, sed tio tamen, nerimarkate, maldensigas la beletrecon, diluas la arton, eĉ se tio neniom adulteras la sciencan aŭ fakan nivelon de la verko. Sekve, plezuro kaj utilo estas ĉefe trovendaj en la historia fundo de la rakonto, ĉar la frazado ofte donas malmultan beletran ĝuon.

Tamen la verko, kiu sendube postulis seriozan dokument-esploradon, vere estas fortostreĉaĵo. Por prezenti la faktojn de la historio la aŭtoro devis elpensi kaj strukturi fikcian framon. La fikcio servu al la eksponado de historia epizodo: ĝi devas krei koheran priskribon de la realo kaj igi tiun pli viva, pli kredinda, pli konvinka. Multaj detaloj pri la „civilizo de la Romanoj” estas enŝovitaj tra la teksto, tiel ke, iom post iom, kvazaŭ senkonscie, ni absorbas la etoson de la granda urbo kaj la vivo en kaj ĉirkaŭ ĝi. Anna Löwenstein teksis, varpe kaj vefte, legindan romanon el fikcio kaj el faktoj. Ŝi lerte pentras interhoman konduton, esprimante homajn sentojn kaj pensojn. La oka kaj lasta parto alportas klimakson: fine sentiĝas ia streĉo. Anna Löwenstein kulminigas la rakonton per resumecca traktado de la imperiestra karaktero: elstarigo de lia psiko.

Ŝi trovis helpojn: apogantojn, instigantojn, provlegantojn; ili korektis kaj konsilis. Tamen ne ĉiuj mistajpoj kaj eraretoj estis elsarkitaj (mi kalkulis kvardek). Krome, ĉu ne ia hezito inter „de” kaj „da”? Vortordo: „Mi vidis plurajn batalantojn ricevi la mallevitajn dikfingrojn, kiujn en Romo oni pardonus.” Vortelektio: „gvardiisto” (gvardiano, gardisto); konfuzo inter „vesto” kaj „vestaĵo”; „forbruligita” (364, 383, kial ne *forbrulinta*?).

Laste du linioj pri la libro kiel materia produkto: bona blanka papero, klara preso sufiĉe grandlitera, firma bindo en fortika supra kovrilo. Ĉio tio faras novnivelan atingon de la eldonejo. Sed, bedaŭrinde, oni ne atentis la vortodividojn: ofte ili ne elegantas: rajtis, rima-rkos, brako-jn, dankop-agon, ek-spalaco, mala-ltan, dancol-ecionoj, sv-ingis, he-jmo. Mi streknombris 38 da tiaj. Sed fojfoje fuŝo amuzas: pub-liko.

Christian DECLERCK

Anna Löwenstein: *Morto de artisto*. Eld. FEL, Antverpeno, 2008. 624 paĝoj kudre binditaj. ISBN 978-90-77066-39-3.

Prezo ĉe FEL: 20 eŭroj + af franko

Honesta portreto pri granda homo



La vivo de Lidia estas multrilate malkutima.

Por esperantistoj, kiuj iom konas nian historion, eble la komencaj ĉapitroj iras tro malrapide, sed ni ne forgesu, ke temas pri anglalingva originalo el la jaro 1985, ne destinita unuavice al internacia publiko: por pli bone komprenigi, kia estis Lidia, la aŭtorino unue donas bildon pri ŝia hejmo kaj precipe pri ŝia patro kaj Esperanto mem. Kaj tio estas trafa decido: ŝin ja formis kiel personon ĝuste tiu fono.

La ĝenerala bildo pri la familio, la estiĝo de lingvo kaj movado, kiun ni ricevas, estas tute bona. Pri la grado de

judeco en la familia hejmvivo, eble ne ĉiuj aŭtoroj konsentus kun la verkintino koncerne la aserton pri la *kompleta* malobservado de L. L. Zamenhof pri tiuj judaj reguloj. Ekzemple, sur paĝo 60 menciigas fojfoja manĝado de ŝinko – detalo konsiderata fikciaĵo. Bedaŭrinde, ties citon ĉi-momente mi ne retrovas.

Esperantistino

La vivo de Lidia estas multrilate malkutima: la plej juna filino de Zamenhof, por kiu la antaŭaj gefratoj ja estis

**Ĝis nun en Esperanto
oni povis ricevi nur svagan
bildon pri Lidia...**

**Kaj nun, per ĉi traduko
de tiu ĉi sufiĉe detale
dokumentita biografio
ni ricevas pli firman
bildon pri ŝi.**

jam adoltaj, kiam ŝi ekkonsciiĝis pri la vivo, iasence ekkreskis kvazaŭ sol-infano. Nur 9-jara ŝi eklernis Esperanton por akompani la gepatrojn al la UK en Berno en 1913, kie pli-malpli aŭtomate ŝi ekludis kvazaŭ rolon de princino: ja filino de d-ro Esperanto mem! Se tion tiujare ŝi ne farus, ŝi devus resti hejme. Tiu minaco efikis. De post tiam ŝi ne plu ĉesis okupiĝi pri la Internacia Lingvo: jam frue ŝi komencis traduki en ĝin kaj fariĝis bonstila aŭtorino. Ĉiuj konas ŝian tradukon de *Quo Vadis?* kaj *Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko*, sed ankaŭ plurajn aliajn tradukojn kaj proprajn tekstojn ŝi aŭtoris.

La idea fono

Lidia ofte emfazis, ke por ŝia patro la lingvo mem ne estis la plej grava afero: spirita proksimiĝo por Zamenhof ĉiam estis pli grava. „Iom post iom Esperantujo fariĝos edukejo de la estonta interfratigita homaro (1907, p. 126)”. Tio instigis lin al Hilelismo, poste – pli ĝenerale – al Homaranismo. Lidia mem renkontis Bahaismon pere de Martha Root okaze de la publika dediĉa ceremonio pri la tombomonumento de Zamenhof en 1926; s-ino Root unue prezentis

tiun religion al ŝi kiel „formo[n] de Homaranismo”. Tiu ĉi renkontiĝo kun la plej nova branĉo en la religio-familio: judismo – kristanismo – islamo – bahaismo, estis la dua ĉefa okazaĵo en la vivo. Por ŝi la judismo ĝis tiam estis nura identigilo koncerne la devenon: religie ŝi sin ne sentis juda. Sed en tiama Pollando oni „ja bezonis ien aparteni” [mia esprimo]. Do juda ŝi sin nomis. Religie, tamen, baldaŭ ŝi fariĝis vera fidulino je Dio, pere de ties profetoj de Bahaismo: la tiama Gvidanto, Shogi Effendi, por ŝi estis vera proksima spirita patro-konfidenculo. Kaj pri Bahá’u’lláh ŝi ofte parolas, kvazaŭ temus pri Dio mem: unu cito el inter multaj sur paĝo 321: „Bahá’u’lláh elaŭskultis miajn preĝojn”. Nintinte ĉi tiun citaĵon, mi tuj konsciiĝis, ke multaj kristanoj sammaniere parolas pri Jesuo, kvazaŭ simple Dio li estus. Ĉie ŝi serĉis gvidadon de Dio, ofte kvazaŭ moderna viziulino, kies viziojn ni ne konas, ŝi faras decidojn, kiuj supraj kontraŭas ĉiun eblan personan profiton, pro iu mistera sento, ke tiel *devos okazi*. El teksto, kiu randas je vizia literaturo: paĝo 376: *Kredo, lernis ŝi, eble estas nur aranea fadeneto, sed ĝi kapablas triumfi super ĉiuj potencoj de l’ malhelo. Ĉar, kiu, kiel la eta araneo sur la sojlo de la Sanktejo, „trovos ankoraŭ en sia koro unu radieton de kredo, tiel delikatan kaj etan kiel aranea fadeno, ne pereos en abismo, sed se eĉ ĉiuj potencoj de tiu ĉi mondo ekbatalus kontraŭ li, por puŝi lin malsupren, eĉ en la falo mem li haltos, kaj per tiu ĉi radio, kiel per la biblia ŝtuparo, eĉ el la abismo levos sin al la ĉielo”*.

Agado

Je certa momento ŝi iel kombinas ambaŭ siajn misiojn: ŝi fariĝas sukcesa Ĉe-instruistino, faras multajn propagando- kaj instruovojaĝojn, kaj allogas al la lingvo plurajn milojn da novaj homoj, kaj paralele ŝi faras paroladojn pri la bahaa religio, fariĝas intima kunlaboranto de ties misiistoj. Unufoje ŝi iras pilgrime al Palestino, al por bahaano sanktaj lokoj, renkontas la Gvidanton.

Post kelkaj laboro en Eŭropo en

1937 Lidia ekiras al Ameriko (paĝo 240): Usono kaj iom Kanado. Samtempe en la monda historio plej obskuriĝas la nuboj de hitlerismo kaj de la diskrevonta dua mondmilito. Dum en Ameriko ŝi estas, prelegas, instruas, ĉie ĉirkaŭe kreskas

**La fotoj, kiujn oni renkontas,
estas ege bonvena riĉigo
de la libro – unue,
estas bone vidi, kiuj estas
la koncernaj homoj mem;
aliflanke, la tiama aspekto
de la bildoj tiel forte vekas
la etoson de l’ foraj tempoj.
Belege.**

la timiga obskuro. Tiun minacon certe klare ŝi perceptis. Sed unuflanke ŝi ne povis senlime plilongigi sian restadon en Ameriko – ŝi ne ricevis novan vizon kaj eĉ estis problemoj pri enspezoj el la kursoj (ofte nura liliputa aŭ simbola pago – feliĉe ŝi gastis senpage, alie ŝi ne eltenus!), kiujn ŝi estis kontraŭleĝe ricevinta; aliflanke, iel revokis ŝin hejmen la devosento kaj la certeco, ke en la malfacilo ŝi devas esti ĉe la siaj. Ŝiaj rakontoj pri sonĝoj el tiu epoko klare reflektas la tiamajn timojn kaj danĝero-konscion.

La libro

La verko fine rakontas pri ŝia pereco – murdita en Treblinka. Finas la libron klarigo pri fontoj uzitaj kaj utile ampleksa indekso.

La fotoj, kiujn oni renkontas, estas ege bonvena riĉigo de la libro – unue, estas bone vidi, kiuj estas la koncernaj homoj mem; aliflanke, la tiama aspekto de la bildoj tiel forte vekas la etoson de l’ foraj tempoj. Belege.

Resume


Ĝis nun en Esperanto oni povis ricevi nur svagan bildon pri Lidia: Isaj Dratwer – *Lidja Zamenhof, Vivo kaj*

agado, 1980; li almenaŭ donis la plej bazajn informojn pri ŝia vivo, kune kun pluraj leteroj ŝiaj el la Esperanto-Muzeo en Vieno, kaj Julian Modest per sia *Ni vivos! Dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof* (Hungara Esperanto-Asocio, (s.j., 1985?) donis eble iom romanigitan teatran impreson.

Kaj nun, per ĉi traduko de tiu ĉi sufiĉe detale dokumentita biografio ni ricevas pli firman bildon pri ŝi.

Dumlegade mi fariĝis ĉiam pli sciivola, kio entute enestis en la baldaŭ aperonta *La Originala Verkaro de Lidja Zamenhof*: fojfoje la teksto de tiu ĉi biografio citas, foje iom resumas el leteroj kaj aliaj verkaĵoj de Lidia: prelegoj, rakontoj, raportaĵoj – kiuj kune promesas impresan tutaĵon. Persone, ekzemple, mi sciolas pri ŝia eseo „Vojoj de Dio” (paĝo 330). Jam el pluraj citoj ĉi-libre oni povas konstati, ke Lidia ankaŭ literature havis talenton. Sed al mi ne fariĝis tute certe, kio ja konserviĝis el tio, kion ŝi verkis. Bernhard Westerhoff redaktis la baldaŭan volumon. Do ni vidos!

Gerrit BERVING



Wendy Heller: *Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof, filino de Esperanto*. Tradukis el la angla Bernhard Westerhoff. Eldonis FEL, Antverpeno, 2007. 398 paĝoj. ISBN 9789077066362.

Prezo ĉe FEL: 28,99 eŭroj + afranko.

Sendu la solvon antaŭ la 1a de julio 2009 al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete al enigmoj@monato.net. Multe da plezuro!

[illegible]

jarsezono (R) + metala blovinstrumento
eŭropa lando + nur malmulte
sublime + kolere kriegas
konsidere + afrika rivero
stila figuro (R) + pinglas
supro + moskea turo
planedo (R) + amerika lando
speco de kartludo (R) + ventodirekto
komutu + gramatika nombro
kvarangula pinta kolono (R) + plano
profunda kruta valetto (R) + malgranda ornama desegnaĵo
laktuksimila herbo (R) + jara neta profito kompania
eluzi + malsamspeca
rilata al karna elkreskaĵo + korpa ĉirkaŭo ĉe niveloj de koksoj
elektra mezurunuo (R) + komisiito
cedu kontraŭ difinita prezo + muzikaĵo por pli ol unu voĉo
publika festo flandra (R) + ekskluzivitaĵo
kovras per ŝtofoj + aŭstralia insulo
ŝtonpeco finiĝante per kapitulo (R) + eŭropano
bleki kiel kato (R) + matena krepusko

Solvo de la litera sudoku novembro

Kore gratulas, via enigmo-redaktoro

M	I	L	C	E	N	T	O	K
C	E	O	K	T	M	N	L	I
K	N	T	L	I	O	C	M	E
I	T	E	O	M	L	K	C	N
L	K	N	T	C	I	O	E	M
O	M	C	N	K	E	L	I	T
E	C	K	I	L	T	M	N	O
N	L	I	M	O	K	E	T	C
T	O	M	E	N	C	I	K	L

anoncetoj

Sur Interreto aperis **La Teorio pri Ĉio**, vivoverko de Manuel Halvelik, je la adreso www.sotragogismo.net. Ĝi estas senpage elŝutebla, sed ege ampleksa.

La **Deklingva manlibro pri politiko** de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono. Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, butiko@fel.esperanto.be kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.

Vizitu Iperity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 1700 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iperity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 lhász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.Komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

Edwin de Kock

Sub Fremdaj Ĉieloĵ

“Nekutime leginda verko”

Donald Broadribb



Ne nur poezio estas en la libro ... enestas, kompreneble, liaj “Lastaj poemoj” sed ne malmultaj scios ke post tiuj “lastaj” li jam verkis sufiĉe multe da postlastaj, kaj iuj el inter tiuj ankaŭ estas troveblaj en tiu ĉi honora kompilaĵo. Tre legindaj estas i.a. nepre la eseoj pri la historio de Esperanto en Sud-Afriko, pri la memorindaj personoj kiujn Edwin renkontis en kaj ekster la verda mondo.

Sed... prefere malkovru mem!

Paĝoj: 288; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 32

Pezo: 333 g

ISBN: 978-90-77066-33-1

Prezo ĉe FEL: 22,50 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be